



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Jara abonkotizo 30,- GM

Abonu nun

Pilo-Press por

1976

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pidel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg

1

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 35/1975 6 oktobro 1975
Aperas ĉiusemajne

Junularinterŝanĝa servo de GEJ

Darmstadt (pp). Jus aperis cirkulero de Germana Esperanto-Junularo pri la Junularinterŝanĝa Servo.

La servo nur ĵus ekfunkciis. Per la cirkulero Germana Esperanto-Junularo invitas eksterlandajn junajn esperantistojn al 17 germanaj urboj, kie ekzistas la ebleco senkoste loĝi ĉe esperantista familio.

Temis ĝis nun pri jenaj urboj: Berlin, Bonn, Cloppenburg, Darmstadt, Essen, Hamburg, Köln, Lohne, Münster, Neustadt/Weinstraße, Offenbach, Paderborn, Pfaffenhofen, Scheyern, Tübingen, Würzburg, Zweibrücken.

En ĉiu loko estas kompetentulo kiu zorgas pri la loĝado ktp.

La ĉefa celo de la servo estas ne simple la senkosta loĝado, sed la intenco doni al niaj junaj esperantistoj la eblecon uzi sian Esperanton hejme kaj vigligi nian junularan E-movadon en FRG, opinias GEJ.

GEJ ankoraŭ serĉas kunlaborantojn, enlandajn gastigantojn, eksterlandajn gejunulojn, grupojn en eksterlando ktp.

Ne nur unuopaj junuloj estos ~~konvenaj~~, sed eblas ankaŭ la organizado de kompleta vojaĝo tra FRG.

La cirkulero pri la interŝanĝa servo estas havebla kontraŭ internacia respondkupono ĉe Christof Roether, Carlo-Mierendorff-Str. 73, D-61 Darmstadt-Eberstadt.

La listo aperos ekde 1976 en la broŝuro de Pasporta Servo.

Pliajn informojn donas: Franz Kruse, 6101 Roßdorf, Löwengasse 16, telefono: 06154/813 90

Das Porträt

Karin Lawerino

La virino por esperanto

Achtzig Prozent dessen, was geredet wurde, hat sie im vergangenen Jahr im badischen Oberkirch verstanden, als die bundesdeutschen Esperantisten ihren nationalen Kongreß abhielten. Heute, als Kopenhagen den Weltkongreß der Kunstsprachenthusiasten ausrichtete, unterhielt sich Karin Lawerino schon am zweiten Tag mit gleich Artikulierenden über biologische Problemfragen. Was kein anderes Idiom auf dieser Erde bringt — Esperanto macht's ihrer Erfahrung nach möglich: in wenigen Wochen kann jedermann die Sprache mühelos bis zur erfolgreichen Unterhaltung erlernen.

Karin Lawerino, selber durch ihre Esperanto-begeisterte Mutter in Paderborn, auf die 38jährige Tochter des Dr. Zamenhof aufmerksam gemacht, muß es eigentlich wissen! Sie ist als Realschülerin am Umland-Gymnasium in Kirchheim/Teck Anglistin von Beruf, hat mehrere Semester Französisch betrieben und in der



Kontaktpersono por

Esperanto kaj Junularinterŝanĝa Servo en

T Ü B I N G E N

estas F-ino Karin Lawerino, D-74 Tübingen, auf der Burg 7

Pri ŝi jam raportis la loka gazeto Südwest-Presse-Schwäbisches Tagblatt.

Cetere ŝi venas el Paderborn, tiu germana urbo, kiu dum la pasintaj jaroj furoris en Esperantujo!

Cetere, ŝia patrino estas la kasistino de E-Societo Paderborn!

Un magicien sur le pont de l'Esperanto

Mejorettes et musique en tête, c'était la fête samedi dernier à Herstal, près de Liège, où le bourgmestre et 200 visiteurs de 6 pays inauguraient le premier «pont de l'Esperanto» du monde.

Originaires du Benelux, de France, d'Allemagne, et du Japon, les participants profitent de cette journée pour échanger leurs idées sur des sujets aussi divers que les minorités linguistiques, l'archéologie, la visite de Louvain (5 octobre) l'émission «Y a un truc» etc.

Pour leur part, Belges et Nordis-

les s'entretiennent avec un membre actif des associations de magiciens de Suisse et d'Allemagne. Usager convaincu de la langue internationale Trixini a présenté ses «trucs» dans plusieurs pays ainsi qu'à la télévision. Son public rit pendant tout son spectacle et Trixini ne s'en tient pas à la prestidigitation, il est aussi un moniteur de marionnettes apprécié à Luxembourg (Grand Duché).

Avant un séjour dans le Nord, il se produira pendant les prochains congrès sans interprètes à Athè-

nes ou à Reykjavik. Trixini rédige un journal paroissial ou paraît une chronique d'esperanto. Il aime particulièrement une devise de Don Bosco «Le diable a peur des gens gais!».

Hansjörg Kindler, l'autre nom de Trixini, a été ordonné prêtre en 1962 et son ministère l'occupe plus que ses différents violons d'ingres. Il faut dire que M. l'abbé Kindler est actuellement curé de la communauté germanophone à la paroisse européenne de Luxembourg.

Esperantista magiisto sur Esperanto-ponto

Herstal (lgx/pp) Okaze de la trilandna renkontiĝo en la belga loko Herstal, kiun partoprenis laŭ la loka gazeto Nord Eclair/ Nord Matin (Francio) 200 esperantistoj el 6 landoj, estis inaŭgurita Esperanto-ponto. Post la inaŭguro de la ponto magiisto amike babilis kun francaj kaj belgaj partoprenantoj. Trixini estas fervora esperantisto, poligloto, magiisto, marionetisto, ktp... Li kore salutas siajn kunfratojn kaj amikojn. Trixini (Hansjörg Kindler) estas pastro de la germanlingva komunumo ĉe la eŭropa paroko en Luksemburgo.

Aŭtuna renkontiĝo

Sint-Michielsgestel (pp) En la nederlanda loko Sint-Michielsgestel okazos de la 17 - 19 oktobro 1975 junulara renkontiĝo (jam tradicia) aranĝita de Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) kaj Germana Esperanto-Junularo (GEJ).

El la programo: Kolombio, riĉa malriĉa lando, prelego kun lumbildoj de Johan Hoekstra
Laborgrupo por komencantoj
Diskutgrupo por aktivuloj
NEJ-membrokunveno

noktpromenaĵo - popoldancado - libervola kantado kaj eble kampadeja fajro

La kotizo estas 25 guldenoj resp. GM.

Aliĝilojn oni sendu al Nederlanda Esperanto-Junularo, Coranthijnestraat 75, Groningen 8003, tel. 050 -775954 (Ineke Emmelkamp). Antaŭpagon de 10,- gld/DM oni sendu al ĉirkonto 719930 Nederlanda Esperanto-Junularo aŭ al p.ĉ. konto Hamburg 3502 41-202 je nomo de Klaus Schubert, 2 Hamburg 65, Duvenstedter Triftweg 26 c. Eksterlandanoj kiu volas resti pli longe en Nederlando povas gastlogi ĉe esperantistoj. Antaŭmendo nepre necesas! La kunvena ejo estas: ZONNEWENDE, Esscheweg 78, Sint-Michielsgestel, Nederlando.

Eŭropa Esperanto-Revuo jare 8 Numeroj de po 12 paĝoj

Jara abonkotizo 16,- DM. La abonontoj novaj por 1976 ricevos senpage la restajn numerojn de 1975! Abonu nun ĉe Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

Kultura semajfino en Sarlando

Blieskastel-Niederwürzbach (pp) De la 17 - 19 oktobro okazos en Bildungsstätte "Junkerwald" de Arbeitskammer de Sarlando la 6a Kultura Semajfino de Sarlanda Esperanto-Ligo.

La programo antaŭvidas:

Kurso A Enkonduko en la Internacian Lingvon
(Karl Burger, Walter Ehrmantraut)

Kurso B Parol-, skrib- kaj traduk-ekzercoj por progresintoj
(Imtraud Hauptenthal, Jean Thierry)

Kurso C: Eugène Adam (Lanti): lia vivo, lia verko kaj lia rolo en la laborista Esperanto-Movado
(Eddy Borsboom, Nederlando)

Informojn donas Sarlanda Esperanto-Ligo, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

SUK-kursoj denove 1976

Pécs (pp/pf) La sekvontaj Someraj Universitataj Kursoj okazos en aŭgusto 1976. La studobjektoj estos biologio, matematiko kaj sociologio. La aranĝo okazos plej verŝajne en Antverpeno, Belgio. Pri la loko de la venontjara SUK oni decidos baldaŭ.

Honorigo por d-ro Artur Bormann

Frankfurto/M (pp) Dum la ĉi-jara internacia aŭtomobila ekspozicio la aŭfergvidanta prezidanto de la Federacia Oficejo por Motorveturiloj, Haderler, transdonis al D-ro Artur Bormann, Reinbek, pro liaj meritoj pri la kreo de "motorveturila legitimilo" (Kraftfahrzeugbrief) la Federacian Merit-krucon je la rubando. D-ro Bormann estas konsiderata kiel la "patro de la motorveturila legitimilo". Ĝis sia emeritiĝo en 1968 d-ro Bormann estis vicprezidanto de la Federacia Oficejo por Motorveturiloj en Flensburg.

D-ro Artur Bormann estas konata ankaŭ en la Esperanto-medio. De jaroj li regule eldonas la Interlingvistan Informan Servon.

Pilo-Press kore gratulas pro tiu alta distingo.

Sonmagazino de Radio Pécs

Pécs (pp/pf) Duonan horon pli frue komenciĝos ek de la 6a de oktobro la sonmagazino de Radio Pécs, kiu enhavas la ĝenerale 5-minutan rubrikon "Eszperantó-sarok" (Esperanto-angulo). Ĝi pritraktas en la hungara lingvo aktualajn temojn pri Esperanto. La sonmagazino "Öttöl-hatig" (De la kvina - ĝis la sesa) komenciĝas je la 17,05 kaj daŭras ĝis la 18a horo, laŭ la mez-eŭropa tempo. La elsendon oni disaŭdigas la unuan lundon de ĉiu monato. Ĝi estas kaptetbla en la meza ondo 344 metra (372 kc), precipe en la suda parto de Hungarujo kaj en kelkaj nordaj regionoj de Jugoslavio. Tiun ĉi programeron oni disaŭdigas de post majo 1972. Poŝtadreso: Radió Pécs, Eszperantó-sarok, H-7601 Pécs, Pf. 200, Hungarujo.

Ekspozicio por virino

La klubo de Roubaix-Tourcoing kaj la Nordfranca Esperanto-Federacio partoprenos dusemajnan ekspozicion pri la "Jaro de la Virino", organizita en Lille (Halo Roger Salengro, Place de Gaulle), dum decembro. La franca asocio por unuigintaj nacioj akceptos, ĉe la diversaj budoj, Nobel-premiitojn, parlamentanojn, verkistojn, edukistojn kaj multajn lernejanajn. (lgx)

El Popola Ĉinio startas novan varbkampanjon

Abonu la ĉinan Esperanto-gazeton nun!

Esperanto en radio

F. W. Poppeck, D-7602 Oberkirch (FRG), malnova propagandisto de Esperanto, instigas per speciala afiŝo la gesamideanojn dum grup-vesperoj kaj aliaj esperantistaj kunvenoj, skribi al la radiostacioj, kiuj disaŭdigas esperantlingvajn programojn. La mem-pentrita afiŝo havas jenan tekston:

"Karaj gesamideanoj!

La sukceso de Esperanto kreskas samgrade kiel ĝia uzado.

Melkaj radiostacioj regule disaŭdigas informojn, paroladojn, eĉ koncertojn en Esperanto.

Sed tiuj radiostacioj bezonas la eĥon el la esperantista publiko. Se oni ne ricevas multajn leterojn aŭ kartojn, tiam oni ĉesigos la Esperanto-elsendojn. Tial ni skribu ĉiam denove al la stacioj. Aĉetu kelkajn poŝtkartojn kaj skribu tuj al jenaj adresoj:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O.Box 46
PL-00-950 Warszawa 1, Pollando

Schweizer Kurzwellendienst Esperanto-Fako
CH-3000 Bern 15, Svislando

O R F, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 700
A-1041 Wien, Aŭstrio

Radio Sofia, Esperanto-Fako, Sofia, Bulgario

Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00 182 Roma, Italio

Radio Zagreb, Esperanto-Fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio

Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Ĉinio "

(Nota: La foto de la afiŝo aperos en la venonta numero de Eŭropa Esperanto-Revuo)

Radio Vieno. En sia elsendo de la 4/5 oktobro Vieno mallonge recenzis n-rön 5 de Eŭropa Esperanto-Revuo, kiu aperis nur fine de septembro. Per tio la Esperanto-Redakcio de Vieno denove montris sian aktualecon. Cetero dum la pasintaj semajnoj la aktualaj komentarioj de d-ro Alfred Macher sin okupis ĉefe pri la elekto al la aŭstria nacia parlamento, kiu okazis la 5an de oktobro. Tiuj komentarioj donis objektivan bildon pri la partipolitika situacio en Aŭstrio kaj multe helpis al ĝia kompreno.

Radio Varsovio. Ĉiam interesajestas por mi la ĉiutagaj radiaj ĵurnalej kaj la komentarioj. La lastaj du Esperanto-Ekspresoj aŭdigis intervjuojn kun agantoj de Monda Turismo, faritajn de Jerzy Upsienski. Al la obstina demando de la intervjuanto, kial Esperanto ne jam enpenetris en la oficialan komercan turismon, oni ne donis kontentan respondon.

Radio Berno. Kuntekste kun Esperanto-Ekspozicio en Zuriĥo dumsomera d-ro A. Baur tuŝis en unu el siaj prelegoj Esperanto-temon: la informado pri Esperanto. Ĉu ekzistas vere 16 reguloj de Esperanto sen esceptoj? Kiu eltrovis la aserton, ke la E-aj vortoj devenas je 60 % el romanaj, 30 % el ĝermanaj kaj 10 % el slavaj lingvoj, li demandis!